



A quarterly organ of the Esperanto Association of Britain
Kvaronjara organo de Esperanto-Asocio de Britio
No. 54, July-September 2011 ★ N-ro 54, julio-septembro 2011

ISSN 1741-4679

**International communication without discrimination ★ Respect for all cultures
Internacia komunikado sen diskriminacio ★ Respekto por ĉiuj kulturoj**

Suda Koreio oficiale instruas Esperanton – universitataj klasoj plenplenas

Jen mi volas doni informojn al vi pri la nuna eduko-situacio lige al Esperanto en Koreio. Nun en Suda Koreio tri universitatoj akceptis Esperanton oficiale kun du notoj kiel elekt-eblan klerigan lingvon por unu semestro:

1. Universitato Korea Fremd-lingva (2 sidejoj);
2. Universitato Dankook (2 sidejoj);
3. Universitato Wonkwang (1 sidejo).

Mi mem nun instruas Esperanton en Dankook kaj Wonkwang, sed iam en Korea Fremdlingva.)

Tio signifas, ke la korea registaro oficiale akceptis Esperanton kiel unu el aŭtentikaj fremdaj lingvoj.

Estas mirinde, ke mia klaso estas plenplena je klasanoj, kiuj volas lerni Esperanton. Tio signifas, ke troviĝas eĉ studentoj, kiuj ne povis kapti ŝancon lerni Esperanton pro manko de permesita seĝo.

Mi en tiu ĉi semestro al ĉirkaŭ 250 gestudentoj instruas Esperanton.

Mi estas preta kunlabori kun ĉiuj por akceptigi Esperanton en lernejojn tra la mondo.

LEE Jungkee, Suda Koreio



• Now 100,000 users of the multilingual Esperanto-teaching website *lernu.net*

(see page 12)

• Umberto Eco at Esperanto stand at Jerusalem International Book Fair

(see page 13)

• Agado en Indonezio

(vidu paĝon 15)

Instruisto Lee Jungkee staras (meze) antaŭ unu sia universitata klaso, kune kun nederlanda vizitantino.

Dankon, LKK!

La partoprenantoj en la 92a Brita Kongreso de Esperanto ĝuis – simile kiel pasintjare – printempan sunbrilon el blua ĉielo, kvankam ĉi-foje blovis akre malvarma vento el la nordo.

Ni ŝuldas elkorajn dankojn al la Loka Kongresa Komitato, kiu multe laboradis por sukcesigi ĉiujn aranĝojn en Eastbourne: Ivor Hueting, Sally Phillips, Brian Barker, kun helpo de Viv O'Dunne en la oficejo de EAB – kun multaj aliaj dediĉitaj bonvoluloj, kiuj plenumis ĉiu sian taskon por la tuto.

Fore je kelkaj paŝoj – fore de neeviteblaj singultoj, preferoj kaj malpreferoj de la vivo – oni rimarkas, kiel bone la homoj kunlaboras: diversaj personoj plenumas ĉiu sian eron, el kio la organizantoj produktas ion, kio sendube plaĉas al la plimulto. Refoje meritplenan dankon al ĉiuj pro agrabla kaj fruktodona semajnfino inter samideanoj – kaj kia plezuro denove kongresi kun nia aktiva junularo JEB!

Geoffrey Sutton

- Material for the next issue of *EAB Update* should be with the editor no later than 26 August.
- Materialo por la venonta numero de *EAB-Ĝisdate* atingu la redaktoron plej laste la 26an de aŭgusto.



Supre: Bele skulptita terglobo estis taŭga skulptaĵo antaŭ enirejo de la Kolegio. Sube: Kongresanoj postprograme kunestas sub florantaj arboj.



EAB-Update / *Ĝisdate* is a quarterly organ of the **Esperanto Association of Britain** / estas kvaronjara organo de **Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House / Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE.**

- Tel. 0845 230 1887 / +44 (0)1782 372141
- Fax / fakse: on request / laŭpete
- E-mail / rete: eab@esperanto-gb.org
- Websites / ttt-paĝaroj: www.esperanto-gb.org
www.esperantoeducation.com

□ Membership of EAB costs £25 a year (£20 concession); supporter or youth member £10 / Membrigi en EAB kostas £25 pundojn jare (£20 rabatite); subtenanto aŭ juna membro pagas £10 pundojn.

☆

□ Material for *EAB Update* should be sent by e-mail, computer disk (rtf format, please) or hard copy direct to the editor / Materialon por *EAB-Ĝisdate* oni sendu rete (formaton rtf, mi petas), diske aŭ papere rekte al la redaktoro: Geoffrey Sutton, 7 Clover Road, Aylsham, Norwich NR11 6JW; e-mail / retpoŝte: gsutton@computekmail.co.uk. Material

may be in Esperanto, English, Welsh or Gaelic / Materialo rajtas esti en la lingvoj internacia, angla, kimra aŭ gaela.

□ EAB also publishes the review *La Brita Esperantisto*, wholly in Esperanto / EAB eldonas ankaŭ la revuon *La Brita Esperantisto*, tute en Esperanto.

☆

□ EAB is a registered charity (No. 272676) and an affiliated national association of the **Universal Esperanto Association**, which has official relations with the United Nations and Unesco / EAB estas leĝe registrita bonfara asocio kaj aliĝinta landa asocio de **Universala Esperanto-Asocio (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 Rotterdam, Nederlando. Tel. 00 31 10 436 1044; fax / fakse: 00 31 436 1751; e-mail / retpoŝte: uea@uea.org; www.uea.org)**, kiu havas oficialajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko.

☆

□ The views expressed in *EAB Update* are not necessarily those of the Management Committee of EAB / La opinioj esprimitaj en *EAB-Ĝisdate* ne nepre estas tiuj de la Administra Komitato de EAB.

La Brita Kongreso refoje sub sunbrilo

Jen kongresa raporto de juna membro Thomas Preece. Li verkis ĝin unuavice por NoJEF – la fonduso, kiu subtenas partoprenon de gejunuloj en Esperanto-aranĝoj.

La Brita Kongreso de Esperanto 2011 en Eastbourne estis grava okazaĵo por mi persone kaj por JEB, reprezentante la kulminon de granda projekto, kiu komenciĝis en decembro kaj postulis multajn horojn da laboro – sed samtempe estis nur la komenco. Estas precipe dank' al NoJEF, ke mi povis partopreni tiun gravan



Supre: Parto de la Kolegio de Eastbourne, kie okazis la kongreso. Maldekstre: Staras prezidanto de EAB, prof. John Wells, kiu bonvenigas la oficialajn gastojn ĉe la Malfermo. Ĉetable sidas, de dekstre, vicurbestrino Margaret Salsbury, organizantoj Ivor Hueting kaj Sally Phillips, kaj la loka parlamentano Stephen Lloyd.



Supre: Junaj partoprenantoj paŭzas por babilo sur la herbejo.
Sube: Ĉe la Malfermo





Tim Owen lumigis por ni la pozicion de Esperanto en la virtuala mondo.

aranĝon, kaj mi ege dankas pro la subvencio, kiun mi ricevis por helpi mian ĉeston.

Hotelĉambroj amasmenditaj

Alveninte frue la unuan tagon de la kongreso, ĉar mi konsentis helpi pri teĥnikaj aferoj kaj la registrado de la ĉefaj prelegoj, min renkontis ĉe la stacidomo de Eastbourne unu el la estroj de la kongreso, kiu veturigis min al la kongresa hotelo. Estis laŭ mi bona ideo de la organizantaro amasmendi hotelĉambrojn por la ĉeestontaro, ĉar estas unu afero malpli por prizorgi, kiam oni klopodas aranĝi sian ĉeston. Fakte estis tiom da partoprenantoj, ke unu hotelo ne sufiĉis: ankaŭ ĉambroj en dua estis

bezonataj. La elektita hotelo estis ne tro multekosta, sed relative komforta kaj oportune proksima al la ĉefa kongresejo – teatrejo de la privata mezlernejo Eastbourne College.

Verdire tiu aŭditorio pli ol sufiĉis por nia kongreso; ni uzis eble nur trionon de ties sidlokoj. Ĝi estis tiel granda, ke mi, plej malantaŭe en la sonbudo, apenaŭ povis aŭdi la voĉojn de la parolantoj sur la scenejo, kio tute malhelpis la registradon, kaj pro tio kaj ekipajaj problemoj ĝi fuŝiĝis. Domaĝe, sed bedaŭrinde tiaj aferoj foje okazas.

Solena Malfermo

La ĉefa programero de la unua tago okazis dum la vespero en la

Urbodomo de Eastbourne. Tie solene malfermiĝis la Kongreso; ironie por kongreso kies temo estis 'lumo', la ĉambro estis iom tro malhela por mia baznivela fotilo. La loka parlamentano, kvankam ne esperantisto, donis mallongan sed bonan parolon en la Internacia Lingvo.

Mi konfesas, ke mi ne vere ŝatas ceremoniojn, do mi ne sentas min kompetenta por taksii la kvaliton de la Solena Malfermo, sed laŭ aliaj ĝi estis bona okazaĵo.

Studis en trinkejo

Post la Malfermo okazis verspermanĝa bufedo. Bedaŭrinde kelkaj el la junuloj, inkluzive de mi, taksis 'bufedon' kiel 'bankedon'; ni atendis aparte grandan manĝon kaj pro tio relative malmulton manĝis pli frue. Certe por la plimulto la manĝoprovizo tute sufiĉis, sed post manĝi ni daŭre malsatis, do ni foriris por trovi plian manĝon. Ni elektis sendependan trinkejon. Kion la tieaj 'normaluloj' pensis pri tiu granda homamaso laŭte parolanta strangan fremdlingvon, invadinte la kvietan *pabon* (laŭ lingvouzo de la Londona junularo) por resti tie la tutan vesperon, mi tute ne scias. Tamen oni aparte rimarku, ke la foto (p. 8 *supre*) montras, ke JEBanoj eĉ en trinkejo diligente studas la lingvon!

Sabaton matene mi sidis en la teatreja sonbudo, klopodante sonregistri la prelegojn – sed bedaŭrinde preskaŭ neniu sono de la scenejo atingis tiun plej malantaŭan parton de la aŭlo! Tiel mi maltrafis interalie prelegon de John Wells (*foto sur p. 7*), kies lumbildoj aspektis, kiel kutime, tre interesaj.

Post frustra mateno de fuŝita registrado kaj fina rezigno venis la horo por tagmanĝi. Denove malsataj, kaj memorinte la manĝon de la antaŭa vespero, grupo de ni junuloj elektis ne partopreni la komunan manĝon sed denove iris trinkejen. Tie ni luncis, babilis, diskutis kaj tiel

The membership's votes were as follows:

	For	Against	Abstentions
Ian Fantom	4	55	22
Clare Hunter	78	1	2
Edmund Grimley Evans	67	5	9
Tim Owen	79	2	0
Ed Robertson	74	1	6
Michael Seaton	73	1	7
John Wells	77	2	1
<i>For president:</i>			
Ian Fantom	6		
John Wells	74		

• The following were elected to the Management Committee: Clare Hunter, Edmund Grimley Evans, Tim Owen, Ed Robertson, Michael Seaton and John Wells (president).

plu, sed ne tro longe, ĉar ni devis reveni ĝustatempe por la Jarkunveno de JEB.

'Rejuniĝinta' JEB

La diskuto dum la JEB-Jarkunveno certe viglis. Estis multe por diskuti rilate al nia lastatempa projekto 'JEB-Rejuniĝo', kiu celis ĝisdatigi la organizon por allogi la novan generacion de junaj esperantistoj kaj lernantoj. La ĉeestantoj ĝenerale opiniis pozitive pri la ŝanĝoj, kiujn ni realigis dum la pasintaj monatoj, interalie nova repaĝaro kun 'duonprofesia' desegno. Restas iom da laboro farinda – ĉefe tradukado – sed la ĝeneralan stilon kaj etoson de la nova retejo ŝajne ŝatas la membraro, kaj ĝi jam funkcias kaj videblas ĉe <http://jeb.org.uk>, kiel bona simbolo de nia 'rejuniĝinta' JEB.

Ege malkutime por JEB-Jarkunveno, ni bezonis multe pli ol la permesitan tempon (ĉefe pro longa kaj entuziasma disputo pri aĝlimoj), kaj ni devis foriri de la ĉambro, por ke la komencanta leciono povu rekomenciĝi. Ni daŭrigis la kunvenon sur eksteraj benkoj – bone ke la vetero belegis! Elektiĝis tute nova komitato, inkluzive de mi kiel Prezidanto kaj Guy Johnston kiel Sekretario.

'Verda Ŝtelo'

Pro la longa Jarkunveno ni bedaŭrinde maltrafis la tuj



Plej supre: La eksterlandanoj sin montras sur la podio dum la Malfermo. Due: Dum la postmalferma bufedo en la Urbodomo. Supre: Komencantoj kune lernas. Sube: Demandoj al la Komitato ĉe la Jarkunveno de EAB.



Writing competition winners

At the British Esperanto Congress in Eastbourne, the winners of the 2010 Writing and Photo Competition were announced:

- In *La Brita Esperantisto*: Joyce Bunting for her story of the Estoril murder 'Kompatinda virino' (www.esperanto-gb.org/lbe/arkivo/968/10).
- In *EAB Update* (No. 50): Rob Hawkins for his report on the British Congress in Llandudno.
- On the EAB website: Paul Roberts for his report on JEB in Cardiff (www.esperanto-gb.org/eab/eab_news/2010-02-06_kairdiff.)

Although the original intention was to rank the winners, the judge – Ed Robertson – felt that, this being the first year, it would be more appropriate to have three equal winners. Each received a £15 voucher to use in the EAB bookshop.

During 2011–12, EAB is again running this competition for anyone who would like to contribute. Every contribution published will be considered by that publication's editor, then an independent judge will pick a winning submission. The winners will be announced during the 2012 British Esperanto Congress.

Contributions to *La Brita Esperantisto* must be in Esperanto only, whilst *EAB Update* accepts submissions in English, Esperanto, Welsh or Gaelic. If you're writing for the EAB website, please do so in English only. The editors may choose to accept photographs, drawings or cartoons, as these too will be accepted in the competition.

Should you have any questions, please feel free to get in touch with EAB trustee Clare Hunter at clareh662003@yahoo.de.

postajn programerojn, sed dum la kongresa kafaŭzo enkondukis nin Neil Roberts al sia hejmfarita tabulludo Verda Ŝtelo – esperantigo de anglalingva vortludo Snatch, en kiu oni povas fari la plej multajn vortojn, sed ĉiam devas zorgi, ĉar la aliaj ludantoj povas ŝteli de vi viajn vortojn por krei pli longajn por si! Mi rimarkis fortan korelativon inter la kvanto da fivortoj sur la tablo kaj la ofteco de mienoj ĉe la 'olduloj', sed mi tute certas, ke tio ja devas esti koincido, ĉu ne?

'Geokaŝado'

Post la kafaŭzo ni disiĝis en diversajn malgrandajn grupojn: kelkaj ĉeestis prelegojn, aliaj vizitis Beachy Head. Mi elektis aliĝi al grupo, kiu geokaŝadis – mia unua sperto de tiu interesa ludo, en kiu oni serĉas kaŝitajn objektojn per la helpo de GPS. Ni trovis unu kaŝon eĉ kamuflitan kiel bolto ĉe la fino de la marponto! Ni vespermanĝis en bonega itala restoracio, geokaŝadis iomete pli, kaj venis al la fino de sabato.

Jarkunveno de EAB

Dimanĉon okazis la kutima diservo flanke organizita de FBCE – ĉi-jare estris virino de la Savarmeo, kaj pro tio la himnoj estis kantitaj laŭ kompaktdisko de latunaj blovinstrumentoj. Tuj poste komenciĝis la Jarkunveno de EAB, dum kio ĉio pasis glate ĉi-jare. Elektiĝis al la Administra

Supre maldekstre: *Paŭlo Gubbins* prezentas la ĵus publikigitan diskon Barlastono bis! (*Vidu p. 24*). Maldekstre: *Enviĉo dum kafaŭzo*. Sube: *Babilado ekstere*.



Fotis Thomas Preece

Komitato tri homoj de la antaŭa Komitato de JEB. Fine de la Jarkunveno estis prezento de donacoj al la emeritiĝanta EAB-kasisto, Joyce Bunting, kaj de premioj por elstaraj kontribuoj al la gazetoj de EAB, inkluzive de du al junuloj: unu al Rob Hawkins, kiu verkis pri la lastjara kongreso en Llandudno, kaj unu al Paul Roberts pro sia raporto pri la JEB-semajnfino en Kardifo.

Interreta informfuŝo

Kontrolinte la trajnhoraron, mi malkovris, ke preskaŭ ĉiuj trajnoj al Londono de tiu tago estis nuligitaj! Tial mi elektis foriri pli frue ol mi intencis – pli-malpli tuj post la Jarkunveno. Kiam mi alvenis al la stacidomo, mi trovis, ke la interreta horaro malĝustis – neniuj trajnoj nuliĝis, ili simple iris laŭ nekutima vojo. Do bone, ke mi spertis neniujn vojaĝ-

Dekstre: Vilĉjo Walker diligente prizorgas teknikajojn por prelegoj. Sube: John Wells denove regalas nin per unu sia interesega prelego, ĉi-foje pri kiel lingvoj traktas kolorojn.



problemojn, sed ĉagrenete, ĉar mi forlasis la kongreson pli frue ol vere bezonate.



Komencanto komentas

Oni scias, ke oni estas en Eastbourne, la marborda urbo en suda Anglio, kiam oni trovas tenilojn en la banĉambro, kaj la tubaro metas la varman kranon dekstre. Je ĉi okazo ĝi estas loko, kie la temperaturo estas tenata alte, sed fortaj malvarmaj trablovoj estas permesataj – alivorte la suno brilas de la sennuba ĉielo dum blovas de la mal-varmega oriento. Perfekta loko por la kongreso.

La Kongreso komenciĝis bone je vendredo per la malfermo, kiun la loka parlamentano ĉeestis. Dum la sekvanta bufedo, kreiĝis multaj malgrandaj grupoj por diskuti. Bedaŭrinde por mi, la ĉeesto de la parlamentano, kiu ne parolas Esperanton, altiris min por diskuti la alternativan baloton kun li.

La sabato estis pli bona. Estis la unua fojo, kiam mi aŭdis kaj aŭskultis la lingvon parolata dum longaj periodoj kaj kun diversaj prononcm manieroj. Do mi trovis, ke pro la rapideco de la prelegoj estis malfacile kompreni. Dum la tagmeza manĝo mi parolis kun studantoj de Bristol kaj Londono pri teknikaj aferoj. Tio plaĉis al mi, ankaŭ kiam kvar el la ĉeestantoj eliris sur la balkonon por diskuti astronomion k.s. Alie la bruo ĉirkaŭanta en la ĉambroj, kiam ĉiuj parolis, malhelpis min aŭdi sufiĉe bone por kontribui.

Tamen je dimanĉo estis multe pli bone, eble ĉar mi jam sciis pri la temoj, pri kiuj oni prelegas. Havante unu solan kongresan temon, 'Lumo', dum la tuta semajnfino helpis enfokusigi la menson. Temas pri eksperimento ne plene sukcesa, sed mi opinias, ke mia komprenado pliboniĝis dum mia tempo tie.

Ĉu mi iros denove? Nur post kiam mi uzis la lingvon multe pli ol nun. Ĉu estis ĉeestinde? Nepe jes.

Andy Pepperdine

Esperoj pri radiolanĉo

Tamen antaŭ mia foriro parolis al mi Veronika Poór, dirante, ke ŝi volas starigi projekton por krei tuttempan tut-Esperantan interretan radioservon. Tiun projekton ankaŭ mi jam delonge volis fari – fakte plurfoje provis, sed pro diversaj kialoj malsukcesis, ĉefe pro la fakto, ke mi laboris sola. Do estis bonege trovi kunlaboranton por la projekto, kaj dum la semajnoj post la kongreso ni jam sukcesis starigi privatan provelsendon, kaj daŭre progresas negocoj kun la estro de la Esperanta eldonejo Vinilkosmo pri muzikaj rajtoj. Mi tre pozitive taksas nian ĝisnunan progreson kaj esperas, ke ni povos lanĉi ion publikan dum la venontaj monatoj!

Estis iom da fuŝado, kiun pro miaj lastatempaj spertoj ĉe

Dum la restoracia bankedo



Fotis Thomas Preece

Pli pri la Kongreso

- Partoprenis 88 personoj, kio estas pli alta nombro ol en la pasintaj kelkaj jaroj.
- Granda memoraĵo estis abundaj manĝoj. La komenc-taga bufedo estis pli ol sufiĉa por la partoprenantoj (almenaŭ via redaktoro reiris por dua porcio), kaj pluraj surpriziĝis ricevi inkluzivite du plenajn tagmezajn manĝojn.
- Paŭlo Gubbins vigle prelegis pri la realigo de publikigo de dulingva antologio pri Esperanta literaturo kaj kulturo, kiun Londona eldonejo petis enirigi en sian kurantan serion.
- Sally Phillips kaj Peter Bolwell rolis por nia ĝuo en teatraĵeto *Voĉoj* de Paŭlo Gubbins.
- Flankkunveno diskutis la Delegitan Reton de UEA, kie ĉefrolis nia brita ĉefdelegito Hilary Chapman.
- Estis volontule prizorgataj librobudo kaj kafejo, kaj pluraj instruantoj prizorgis bezonojn de diversnivela komencantoj.
- Terry Page prelegis pri la fiziko de la lumo.



Laŭdire la foto montras JEBanojn, kiuj diligente studas la lingvon!

kongresoj – kaj lokaj kaj internaciaj – mi bedaŭrinde taksus kiel kutima afero en Esperantujo, sed ankaŭ multe da sukceso, kaj

ene de JEB kaj de nia nova radio-projekto. Mi ege antaŭgvas la estontecon de ambaŭ.

Thomas Preece

Mia partopreno en Brita Kongreso

Dudek tagojn post la katastrofa cunamo mi ekvojaĝis de Japanio. En tiu tempo ankoraŭ multegaj malfacilaĵoj restadis ĉirkaŭ mi. Tamen, dank' al geamikoj en Britio kaj Francio, mi povis flugi por unumonata vojaĝo. En la valizon mi enmetis la du bildoteatrojn kaj lokajn ĵurnalojn kun fotoj. Mi antaŭsupozis, ke mi povos paroli pri la granda okazaĵo, ĉar mi venos de Sendai, kies maro estis epicentro de la cunamo.

Kiel atendite, mi devis paroli ankaŭ en la Brita Kongreso. La partopreno en tiu kongreso estis por mi unua sperto, do mi hezitis paroli, kun iom da streĉo, kvankam la etoso estis agrabla, kaj ĉiam mi ricevis varmajn akceptojn. La ĉefa temo 'Lumo' estis interesa. Poste en la ekskurso mi ŝipe vizitis lumturon tra ondegaj.

Mi ĝuis la gajan manĝon, en kiu oni kompreneble parolis nur Esperanton senkrokodile. La librovendejo estis bona, ĉar oni povis aĉeti ne nur novajn sed ankaŭ malnovajn malkare. Ankaŭ mi aĉetis. Mi proponos tiun manieron en Japanio.

Precipe mi multege dankis al ges-roj Sally kaj Peter, kiuj prizorgis nin en la Postkongreso ĝis la fino. Tio estis en urbo Hastings, kie ni piediris al nacia parko sur la belaj montetoj gvide de Sally. Estis tre bela pejzaĝo. Kaj ni migradis en la malnovaj kvartaloj. Krome, en la Astronomia Muzeo Sally klarigis al ni Esperante pri la kosmo ktp. Vespere ĉiuj postkongresanoj vizitis la domon de Sally kaj Peter, kiuj bonege akceptis nin kun muzikoj, vinoj kaj manĝaĵoj. Ĉiuj tre agrable ĝuis bonan vesperon.

Eastbourne fariĝis jam neforgesebla urbo por mi – ne nur bela maro. Fakte Esperanto estas ponto de landoj, sed mi forte sentis, ke ĝi estas ligilo de homoj. Bonŝance mi povis partopreni en sukcesa kongreso kun dankego. Koran dankon!

Sanpei Keiko, Japanio



La Strategia Laborplano de UEA

Surbaze de la Strategia Laborplano de UEA proponata por la periodo 2011–20 kaj de la decidoj de la Komitato en la laŭvicaj laborsesioj, nia agado por la mandatperiodo 2011–13 starigas la jenajn celojn per laborplano, adaptebla laŭ konkretaj bezonoj kaj cirkonstancoj.

Celoj. Agadkampoj:

1. Informado, Jardeko de Lingvoj

a. Sur ĉi tiu laborkampo ni daŭrigos la tradician diskonigadon de la lingvo Esperanto kaj de la atingoj de la movado. Ĉi-periodo ni aldonas la emfazon, ke esperantistoj delonge kontribudis al la diskonigado de la lingvoj kaj komunumoj kiel *konservindaj valoroj*. Partopreni publikajn forumojn informcele, ekz. librofoirojn. Laŭeble, mem iniciati kunorganizon de tiaj aranĝoj lige al la landaj kaj lokaj kondiĉoj, ĉe universitatoj, asocioj de UN kaj similcelaj organizaĵoj.

b. *Diskonigindaj vizaĝoj*. Kunmeti materialojn kaj laŭeble apartajn verketojn pri diskonigindaj esperantistoj enlande kaj loke, kaj ni tie emfazas la kontribuon de tiuj figuroj ankaŭ al la tutlanda kulturo; internacinivele, oni nomas tiun ĉi agadon 'Projekto Vizaĝoj'.

c. Produkti kaj ĝisdatigi *profesionalajn informmaterialojn* pri Esperanto kaj ĝia movado, transdoneblaj al ĵurnalistoj, lingvistoj, simplaj interesigantoj ktp.

ĉ. Renovigi kaj *daŭre aktualigi la landajn kaj regionajn* (de la komisionoj) *retpaĝojn* por informi kaj varbi al la ekstera publiko.

2. Kulturo; Edukado: Profiligis Esperanton kiel ilon por prilingva konsciigo

a. Kreado kaj diskonigado de *klerigaj materialoj* en Esperanto. Per tiuj materialoj ni pretigas niajn agantojn por pli efike agi sur la unua laborkampo kaj

kultivas la Esperantajn lingvon kaj kulturon mem; laŭeble elekti iujn individuojn, pri kiuj oni disponigas tekstojn en Esperanto;

b. Por pludisvastigi, oni *reliefigu per etnolingvaj, nacilingvaj tekstoj tiujn atingojn de la landa aŭ internacia movado*, kiuj plej rekte

Discover Esperanto: The Booklet – glossy copies for less than a cup of coffee

The fine folk at the Esperanto organisations E@I and ILEI have recently released a 24-page booklet titled *Discover Esperanto*. It's available in several national languages, one of which, of course, is English.

The booklet presents an effective introduction to Espe-

ranto – both the language and its history. Its main contribution, however, is that it reproduces comments from Esperantists about how and why they use the language. An outstanding example would be from the American Amanda Higley, who spent sixteen months travelling in

Europe yet only had to pay for three nights' lodging; the other 470+ nights she spent as a guest of Esperanto-speakers. There is a short introduction to the language that any interested reader can pick up in a matter of minutes. Personal stories, only 100 or so words per person, add individuality and show Esperanto as more than an intellectual curiosity. The much-missed Claude Piron features with an abridged version of an interesting talk from 1998. The booklet closes with informative answers to frequently asked questions.


As you might well expect for Esperanto, the project is an international collaboration, the brainchild of Hakan Lundberg, the design and format by Stano Marček. Our own Simon Davies was involved in proofing the English version, so we'd like to thank him for his contribution to this project.

If anybody asks you about Esperanto, this would be a wonderful thing to show them. And it's with this in mind that we've made a glossy version of it purchasable via our website at the cost of 62p, (or 3 for the equivalent of 51p each).

Please do consider buying a copy; it's well worth a read, but it would be especially useful to lend to a friend who asks you about the language, since it speaks with many voices, rather than one's own.

This booklet could easily entice new people to give Esperanto a chance; costing less than a couple of postage stamps. We would suggest that it's indispensable.

To get an idea of what the booklet is like free of charge, visit the website http://ikso.net/broshuro/pdf/malkovru_esperanton_en.pdf or bit.ly/9WNs1p.



helpas la publikon pli juste taksu la historian kontribuon de la Esperanto-movado al la kulturo de la unuopaj landoj kaj de la mondo. Laŭ propraj kondiĉoj kaj realisme, krei aŭ restarigi labor-grupon pri movada landa aŭ regiona historio.

c. Resti en *nacnivela kontakto kun ŝlosilaj neregistaraj organizaĵoj*, aŭ enlandaj institucioj, ministerioj de kulturo kaj kun la Unesko-komisiono kaj aliaj similcelaj organizaĵoj.

3. **Organiza. Fleksebligo:** Landaj organizaĵoj, kluboj kaj unuopuloj rolu pli aktive kaj centre en

la desuba (surloka) agado de UEA en ĉiuj kampoj. Daŭre instigi niajn aktivulojn kaj gvidantojn pri nia rolo disvastigi Esperanton, instrui kaj baki esperantistojn unualoke kaj labori por proksimigi pliajn homojn al UEA-agadoj.

a. *Kunordigi reorganizan laboron.* Kunagado laŭ celoj, metodoj, rimedoj, homoj. Laŭ la konkretaj cirkonstancoj utiligi la tradiciajn strukturojn kaj la novajn teknologiojn. Identigi reton de lokaj kaj regionaj aktivuloj.

b. Eksplicite kaj kolektive *difini celojn* sur ĉiu nivelo de la agado; identigi la metodojn, rimedojn

kaj ekstermovadajn partnerojn, per kiuj labori al tiuj celoj; plani kaj plenumi la laboron surbaze de la kapabloj kaj limoj de tiuj individuoj, kiuj agas.

c. *Kunlabore* kun ILEI-sekcio kaj fak-aktivuloj akceli la produktadon de lerniloj kaj alispecaj klerigaj materialoj, kiuj utilu por celoj instruaj kaj edukaj.

ĉ. Starigi laborprogramon de *instruista trejnado* kaj seminarioj, kiel esencan elementon de starigota ekzamenado pri 'Instru-kapablo' kaj landaj ekzamenoj.

Maritza Gutiérrez González
Estrarano de UEA
pri landa kaj regiona agado

Esperanto kunrolis ĉe la Internacia Lingva Festivalo de Universitato de Sheffield

Okazis en la norda urbo Sheffield ĝia unua Internacia Lingva Festivalo, kiun organizis pola studento Max Marzec, 20-jara. Iama studento de esperantisto Dennis Keefe en Ĉinujo, Max starigis britan version de ties jam okazintaj festivaloj, lerte arigante internaciecan skipon similan.

Ekde la unua momento tiu teamo donis al Esperanto favoran videblon, menciante ĝin plurfoje en la unua paĝo de la retejo, petante, ke iu esperantisto parolu pri ĝi dum la malfermo, kaj provizante ses lecionojn per lokoj dum la semajnfino.

Tago surprizoplena

Vendredo estis tago surprizoplena, ne nur pro la konstato, ke la evento temis pri ege granda, profesia spektaklo, sed denove pro la plurfoja menciado de Esperanto. Unue, Max petis, ke oni laŭdu dum lia neĉeesto Brian Barker de Esperanto-Asocio de

Britio pro lia reklamada laboro. Li ankaŭ proponis apartajn dankojn al Brian O'Sullivan, kiu, kvankam 81-jara, partoprenis ĉiun organiz-kunvenon. Sed tute neatendita estis la agnosko dum la parolado de la loka parlamentano, Meg Mull, ke ŝia avo estis esperantisto!

La prezidanto de la regiona Esperanto-federacio, Jack Warren, parolis dum dek minutoj pri Esperanto (kiel faris ankaŭ parolantoj de kvar aliaj lingvoj). John Wells estis la gastparolanto, kaj prelegis dufoje.

La unua prelego temis pri lingvoj en lia vivo. Lia lerteco

Ĉina universitata kunlaborpeto

"Laŭ la bezonado de nia Universitato Guangdong Baiyun, en la provinco Gŭandongo, ni volus fari edukan kunlaboradon kun tutmondaj universitatoj pere de Esperanto. Ĉu vi scias, kies universitatoj havas la saman opinion por kunlabori pere de Esperanto?"

"Nun estas kunlaboroj kun anglaj universitatoj (kvar), usona (unu), aŭstraliaj (du), kanada (unu), sed tute per la angla lingvo. Do mi pensas, ke ni povas konstrui novan kunlaboron pere de Esperanto.

"Ni tuj kontaktos, se ili havas la intencon kunlabori en edukado pere de Esperanto. Koran antaŭdankon.

Konu nian Universitaton per www.bvtc.edu.cn/en/wsb/en."

montris sin per la saĝa decido ne paroli tro multe pri Esperanto, sed anstataŭe doni al ĝi la saman tempon kiel al la aliaj lingvoj. Sufiĉis simple diri aldone, ke Esperanto estas lia plej forta lingvo krom la denaska, kaj certe la sola, en kiu li povus fari sian venontan prelegon sen preparado. Tio frapis la aŭskultantaron.

Lia dua prelego estis ege interesa por ĉiuj, ĉar ĝi temis pri enkonduko al fonetiko. John Wells estas tutmonde famkonata pri tiu temo, kaj do ni ĉiuj multon lernis de la majstro, kaj li prave meritis la laŭtan laŭdadon, kiu sekvis. Ĉar tiu tago estis la datreveno de lia naskiĝo, mi invitis al la aŭskultantaro deziri al li 'Ĉion bonan!'. Per kelkaj frapoj de butono la vortoj videblis sur la mur-ekrano, kaj ĉiuj en la ĉambro kantis en Esperanto.

Bona tago por Esperanto

Do tiel iris la malfermo, kiu estis bona tago por Esperanto.

Do you tweet?

• Please note that **Esperanto Twitter Day** <www.facebook.com/pages/Tutmonda-Twitter-Agado-por-Esperanto/196861870344972> will be held on 26 July to coincide with the anniversary of the publication of the "Unua Libro" <www.youtube.com/watch?v=rBX-jAa5VYI>.

The aim is to enter the Trending Topics <<http://support.twitter.com/entries/101125-about-trending-topics>> list of Twitter on that day. Please also use "#Esperanto" when you tweet. We would add that a similar campaign two years ago resulted in a google-doodle with subsequent publicity worldwide. One example is here: <www.seroundtable.com/archives/021357>.



De maldekstre: Max Marzec, ĉeforganizinto, kaj John Wells, fotitaj ĉe la Festivalo

Dum la semajnfino mem okazis la publika aranĝo. Ni dividis nian ĉambrojn kun blinduloj kaj uzantoj de la brita mangesta lingvo por surduloj. Sesfoje dum la semajnfino okazis publikaj prelegoj 45-minutaj, kiujn gvidis por ni Jack Warren. Sabate mi prelegis pri Esperanto, kaj dimanĉe tion faris Paŭlo

Gubbins. Intervjuon por studenta radio faris mi kune kun JEB-prezidanto Thomas Preece. Ĉe la Esperanto-budo deĵoris dum la tuta semajnfino Brian O'Sullivan kaj Gillian Cartledge. Volontulis sabate Thomas Preece kaj tutsemajnfine Marteno Miniĥ, Saŝa Murr, Magnus Henoch kaj Jake Pentland.

Tim Owen

Our apologies if you do not tweet, but we hope that you will pass the above information to anyone who does!

• We have compiled a **list of Esperanto societies in British universities**. We are already aware of informal groups in three universities, as well as many Esperanto-speakers in other universities throughout Britain.

Students at Sheffield University are also attempting to obtain formal acceptance of an officially recognised society there, following the International Festival of Languages (see the article on this spread and the website <http://intlangfest.union.shef.ac.uk>).

As a result of nationwide publicity for the Festival, one of

the interviews about Esperanto occurred on BBC One Breakfast Television.

Brian Barker
www.esperantolobby.net

Franca dokumenta filmo pri Esperanto

La franclingva filmo *Esperanto* de la reĝisoro Dominique Gautier <http://eo.wikipedia.org/wiki/Dominiko_Ga%C5%ADtiero> estis unuafoje prezentita al la publiko, kun lia ĉeesto, la 23an de aprilo, okaze de la interasocia renkontiĝo IREM de Sète (<<http://esperanto.sete2011.free.fr/irem.php?Lingvo=fr&Temo=Bonvenon>>).

La retejo de la filmo estas <http://esperantofilm.com>, kie eblas mendi DVDn de ĝi.

Lernu.net over the threshold of 100,000 registered users!

Lernu.net – a multilingual website that aims to inform internet users about Esperanto and help them to learn it easily and free of charge – has passed an important milestone. It has recently reached 100,000 registered users!

The Esperantic Studies Foundation (ESF) is grateful to Lernu's team and all the volunteers, as well as to all Esperantists whose generous donations

contributed to this success. In fact, Lernu.net is one of the most ambitious and successful projects sponsored by ESF, and this milestone is a great achievement

A friend in need ...

Many of you will know the name Aleksandr Korĵenkov. An eminent member of the Esperanto community, he and his wife, Halina, in 1991 gave up their jobs in order to bring back the defunct magazine *La Ondo de Esperanto*, originally founded in 1909. Some members of EAB will have some familiarity with the magazine, since they received it in place of *La Brita Esperantisto* during Bill Auld's illness and prior to Paul Gubbins' taking the reins.

Halina is seriously ill, her kidneys having failed. She is dependent on dialysis four times a day and will not live without a transplant. Aleksandr and Halina have moved from their home in Kaliningrad to Moscow, the only place in Russia where they can expect an operation to take place. They've gone from the most westerly point of that immense land to the city with the highest rental cost in the nation. Their life savings will last them around six months, whilst they can expect to be there between one and two years.

You can do the maths yourself. Without financial help they will be in a desperate position where Aleksandr will have to find full-time work and *La Ondo* will fold.

La Ondo de Esperanto online

I fully intended to write about *La Ondo* anyway, since I took out a one-year online subscription recently. It cost me €12 for twelve issues. That works out at a mere 86 pence per full-colour edition. I wanted to highlight that anyway, but now it seems imperative that I mention this exceptionally good deal, because it costs Aleksandr nothing to send an electronic copy. In other words, those €12 go straight to him. Simply visit <http://esperanto.org/Ondo/Lo-abon.htm> and select 'Elektronika abono €12' from the drop-down menu.

Some of you might like to consider giving Aleksandr a donation. If that applies to you, then please get in touch with Viv (eab@esperanto-gb.org; tel. 0845 230 1887) and ask her to make it to 'UEA-konto' gore-z. Thank you all in advance.

Tim Owen

not only for the Foundation, but for the whole Esperanto-speaking community. ESF is proud that its financial support has enabled the existence of this unique and most-visited Esperanto website in about 30 languages, with approximately 100,000 page views every day, with well over a hundred volunteer language tutors and translators, and now with a community of 100,000 registered users in 240 countries!

Advert competition

To celebrate this special event, the Lernu! team is holding a competition for the best advertisement for the website (for more information, please visit <http://lernu.net/konkurso>).

ESF is proud of its achievements, and Lernu!'s landmark is a clear example of that. But we see even more possibilities for developing innovative Esperanto projects, and at the same time we need to continue to support and develop the existing ones. Lernu.net, NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto: <http://esperanto.org/nask>) and Edukado.net are actively growing. For example, Edukado.net recently launched Internet Teachers' Training (Reta Instruista Trejnado ĉe Edukado.net – RITE, www.edukado.net/rite), and we have invested in an automated grammar checker for Lernu! to give quick answers to learners and help the language tutors. This is just one initiative that deserves support.

Our ambition exceeds our financial capacities

In fact, our ambitions are already exceeding our financial capacities, and that is why we would like to ask for your financial support. Our foundation does not pursue government funding, and we rely on the generous contributions of people like you, who are passionate about working to establish greater >

Anneleen pluvojaĝas

En la aŭtuna numero de EAB-Ĝisdate aperis raporto pri la ekvojaĝo de juna belgino Anneleen Nys por informi kaj instrui en Sudameriko. Ŝi pluvojaĝas.

Mi estas Anneleen el Belgio, mi havas 23 jarojn. Mi finstudis en junio de 2010 pri komunikadsciencoj.

En julio la granda aventuro komenciĝis... Mi ekvojaĝis al Kubo kaj tie partoprenis en seminario, organizita de ILEI, pri instruado de Esperanto. Poste mi partoprenis en la Universala Kongreso en Havano kaj pasigis unu semajnon en la Internacia Junulara Kongreso.

Post Kubo al Meksiko

Post Kubo mi flugis al Meksiko. Mi tuj enamiĝis al tiu bela multkolora lando kaj ĝiaj nekredible bongustaj manĝaĵoj. Tie mi loĝis en la domo de la familio de Martin kaj Mallely. Ĝi estas vera Esperanto-domo; eĉ la infanoj salutas vizitantojn per feliĉa "Saluton!". Tie mi povis uzi ilian Esperanto-librejon por bone prepari mian prezentadon kaj kurson. Jam ekzistas kelkaj

ege fortaj Esperanto-kluboj en Meksiko.

Mi vizitis la novan Esperanto-klubon en Querétaro, kie almenaŭ dek junuloj kunvenis por havi sian unuan 'veran' konversacion en Esperanto kun eksterlandano. En la ĉefurbo ni donis konferencon en la ĉefa universitato, kie ĉiun semestron prof. Cordova instalas kurson de Esperanto. Poste mi donis kursojn en Puebla kaj San Cristobal de las Casas, tuj antaŭ ol eliri al Salvadoro.

Tie mi ne restis multe da tempo, kaj la laborado estis iom komplika pro la malsekureco. Mi havis interesajn kontaktojn en la

Daŭrigo sur la sekva paĝo

Fruktodona budo ĉe la Internacia Librofoiro de Jerusalemo – vizitis interalie Umberto Eco

Fine de februaro okazis la 25a Internacia Librofoiro de Jerusalemo – prestiĝa aranĝo, kiu okazas ĉiun duan jaron en la plej granda kongresa centro de tiu urbo – Binjane Hauma. Jam la trian fojon sinsekve, Esperanto-Ligo en Israelo (ELI) havis tie budon de Esperanto-libroj kaj revuoj. Sekve de tio, pli ol 40 personoj enskribiĝis por Esperanto-kurso, kaj centoj interesiĝis kaj ricevis flugfoliojn pri Esperanto.

Amri Wandel renkontiĝis kun la fama itala verkisto Umberto Eco (kiu verkis interalie pri Esperanto) kaj donacis al li la novan kompaktdiskon de ELI

Umberto Eco (meze) interparolas kun d-ro Amri Wandel ĉe la librobudo de Esperanto-Ligo en Israelo



Kanti gefratoj kune kaj la plej lastan numeron de *Israela Esperantisto*. Vizitis la budon aliaj eminentaj gastoj kiel la fama israela verkisto A.B. Jehoshua, Salaj Meridor, eksĉefo de la Juda Sohnhnut kaj ambasadoro en Usono (kiu rakontis, ke la onklo

de lia patro estis fama esperantisto Emanuel Olsvanger, kiu en la '20aj jaroj fondis la Esperantomovadon en Jerusalemo).

Pluraj aĉetis la Esperanto-hebrean vortaron de Murĵan kaj aliajn varojn. ELI ricevis oferton de eldonejo Minerva lukse reeldoni la vortarojn de Murĵan kaj proponi en ilia vendejo Esperanto-librojn.

Pliaj fotoj videblas ĉe <https://picasaweb.google.com/Amri.nivut/JerusalemaLibroFoiro>.

Amri Wandel,
Prezidanto de ELI

equality and improved communication and understanding amongst peoples of the world, in order to continue to sponsor Esperanto-related educational and research activities.

You can visit the website to learn more about ESF's activities: www.esperantic.org, and also how you can support the foundation: <http://esperantic.org/en/donations/support>. □

universitato, sed finfine ne havis tempon por vere organizi kurseton. Tamen estas kelkaj aktivaj esperantistoj, ĉefe en San-Salvadoro, kaj ili faradas kursetojn en la universitato.

Granda sukceso en Nikaragvo

Oni atendis min en oktobro en Nikaragvo por instali lingvan budon en la Centraamerika Universitato de Managvo.

Almenaŭ cent interesitoj aliĝis por la kurso, kaj multege pli venis al la budo kun miloj da demandoj. Estis granda sukceso!

Dum la posta semajno mi donis tri kursojn en tiu universitato. Ankaŭ en aliaj universitatoj en Managvo mi sukcesis instali kurson. En Matagalpa intervjuis min radiostacio, kaj mi prezentis en la universitato kaj donis du rapidkursojn. Mi agadis ankaŭ en Granado, antaŭ ol iri al Kostariko.

Kostariko

Tie mi estis dum la kristnaska periodo, do ne okazigis kursojn, sed mi jes renkontis kelkajn

lokajn esperantistojn. Feliĉe estas tie homoj, kiuj daŭre laboradas por Esperanto kaj regule kunsidadas. Ankaŭ estas du instruistoj, kiuj donas kursojn en la teknika universitato de la ĉefurbo, tiel instruante al almenaŭ tridek lernantoj. Mi vizitis ilin dum kurso, kaj kvankam estis nur la dua ilia klaso, ili jam sufiĉe bone komprenis la lingvon.

De Panamo Ekvadoren

Post restadeto en Panamo, mi flugis al Ekvadoro. Mi koncentris mian atenton en la ĉefurbo, Kito. Tie ekzistas grupo pri lingvo-interŝanĝo, kaj estis la plej bona celgrupo, kiun mi povis imagi. Ili ege interesiĝis pri Esperanto. Mi vizitis preskaŭ ĉiujn universitatojn kaj varbis kiel eble plej multe. Bedaŭrinde multaj estas privataj kaj ne vere interesiĝas pri io, kio ne gajnas monon. Feliĉe mi estis ege bone ricevita en la Katolika Universitato. Tie mi donis kelkajn prezentadojn kaj du kursojn.

Kun la lokaj esperantistoj ni organizis kunvenon kaj oficiale fondis Ekvadoran Esperanto-Klubon kun entuziasmaj team-membroj.

Al Peruo

Post Ekvadoro mi buse iris al Peruo, kie mi nun estas. En Huaraz, eta urbo en la Anda Montaro, ege bone ricevis min la homoj, kiuj laboras en la loka Kulturcentro. Ili tuj donis al mi spacon kaj tempon dum la 'Kulturaj Ĵaŭdoj', kie mi prelegis por etaj grupoj. La postan tagon mi donis rapidkurson al ili. La universitatoj estis en ferioj, sed la estro de kultura movado rekomendis al mi iri al la lingva lernejo, kie mi donis prezentadon al junuloj de la angla kurso.

En Limo, la ĉefurbo de Peruo, estas kelkaj esperantistoj. Ni organizis kunvenon, kien alvenis ankaŭ interesitoj. La intereso de la homoj en Limo por Esperanto estas vere impona!

Antaŭ granda defio

La planoj nun estas doni pli da kursoj en la sudo de la lando kaj poste iri al Bolivio, kie Esperanto ankoraŭ estas ege nova koncepto kaj ankoraŭ ne ekzistas granda kontaktlisto. Temas pri granda defio por mi kaj ni ĉiuj!

En venontaj vojaĝplanoj estos Bolivio kaj Paragvajo. En julio mi volas partopreni en la Tutamerika Esperanto-Kongreso en San-Paŭlo, Brazilo, kaj de tie raportoj pri miaj spertoj.

Nepre mi ankoraŭ bezonas financajn rimedojn. Mi ne ricevas pagon, nek mem povas pagi miajn elspezojn. Bv. donaci aŭ al germana fonduso (vidu en *EAB-Ĝisdate*, n-ro 51, p. 8) aŭ al **Fondaĵo Ameriko de UEA** (nepre informu al mi, se vi pagas per UEA – tra EAB eblas). Mi volonte respondas al demandoj: nysanneleen@gmail.com.

Anneleen Nys

Mi helpas lernantojn en la Katolika Universitato de Kito, Ekvadoro. Supre dekstre: Miaj gelernantoj en San Cristobal de las Casas, Meksiko, ekzercas sin. Supre maldekstre: Neformala kunveno de esperantistoj kaj interesitoj en Limo, Peruo.



Longa tajvana filmo kun Esperanto-subtekstoj

Laŭstare en Tajvano aperis la unua longa filmo en Azio kun Esperantaj subtekstoj. La filmo estas dokumenta kaj estis sur ekranoj de grandaj kinejoj dum semajnoj en la pasinta vintro. Ĝia reĝisoro, s-ino Hsueh Chang-hui, entuziasmas pri Esperanto kaj esprimas deziron lerni ĝin kaj iam fari filmon pri Esperanto kaj ĝia historio en Tajvano.

La filmo, titolita *E.SHA Epoko*, rakontas la historion de iama populara kant- kaj danc-trupo kun 52 membroj, ĉiuj virinoj, (inspirita de la grupo Takarazuka en Japanio), kiu eĉ vojaĝis eksterlanden por prezenti siajn muzikalojn. Poste pro politikaj kaj ekonomiaj kialoj la grupo devis ĉesi sian agadon, sed nun



La kovrilo de la gazeto de Tajvana Esperanto-Movado Formoza Folio, kiu montras scenon el la filmo.

post dekoj da jaroj ili revenas por serĉi sian iaman gloron, rememorigi kaj por instrui junajn artistojn pri sia arto. Tial la filmo enhavas amason da kantoj kaj dancoj kun multaj rakontoj pri ilia pasinteco, kaj samtempe spektantoj lernas multe pri la historio de Tajvano.

Oni povas vidi eron el la filmo per Youtube: www.youtube.com/watch?v=CqLed_pL_q8 [Ni provis sensukcese! Red.].

com/watch?v=CqLed_pL_q8 [Ni provis sensukcese! Red.].

La 96-minuta filmo estas mendebla kiel DVD ĉe la Libro-servo de UEA, aŭ pere de EAB.

Krom subtekstoj en Esperanto kaj la ĉina, oni povas elekti ankaŭ la japanan aŭ anglan lingvon. Profito el la vendo iros por progresigi la Esperanto-movadon en Tajvano.

Denove centoj da komencantoj en Indonezio – helpo bezonata

La du instruvojaĝoj al Indonezio (en 2009 kaj '10), pri kiuj vi jam povis legi en *EAB-Ĝisdate* (n-ro 53, p.13), mesaĝoj kaj retejoj, havas kiel sekvon, ke nun – duonan jarcenton post la unua kaj nura landa Esperanto-kongreso en Indonezio – estas denove centoj da komencantoj en Indonezio. Pluraj el ili estas tre lernemaj kaj aktivaj, kaj jam ne plu estas komencantoj. Por ke ili spertu la etoson de la internaciaj Esperanto-renkontigoj kaj samtempe multon lernu, estus bone inviti kelkajn al Eŭropo ĉi-jare (kaj venontjare, eble eĉ pli, al Vjetnamio kaj Japanio).

Tri indonezianoj, nome Sabrina, junulino, kiu kombinas studadon kaj instruadon kaj volas plulerni Esperanton por povi instrui ĝin poste; Pryo, la tradukanto de lernu.net en la indonezian; kaj Ilia, la aktiva sekretario de la Ĝakarta Esperanto-klubo, estas pretaj veni al la ILEI-konferenco, al la Universala Kongreso en Danlando kaj al Somera Esperanto-Studado <http://eo.lernu.net/pri_lernu/renkontighoj/SES/2011/index.php> en Slovakio. Por tio estas kolektata mono ĉe Fonduso Dazzini de ILEI <<http://ilei.info/>> kaj Triamonda Kongresa Fondado

de UEA <<http://www.uea.org>>. Se ankaŭ vi volas partopreni en la realigado de tiu projekto, kiu multe helpos al la indonezia Esperanto-movado, bonvolu ĝirivan kontribuon al la menciitaj kontoj, kun la indiko "indonezianoj".

Same, entuziasma studento el Ĝakarta ŝatus iri al IJK. Li partoprenas la konkurson 'Partoprenu IJKn' de TEJO. Vi povas helpi, ĝirante vian kontribuon al la Fonduso 'Partoprenu IJKn' <<http://tejo.org/eo/partoprenu-ijk-n>> de TEJO. Por pli da informoj, kontaktu min ĉe heidi.goes@gmail.com.

Antaŭdankon, ankaŭ nome de la indoneziaj esperantistoj. Kaj grandan dankon al tiuj, kiuj jam kontribuis!

Heidi Goes, Belgio

Pola ret-radio regule dufoje semajne

Jam ne aŭdiĝas la novaj Esperanto-programoj de Pola Radio, ĉesigitaj fine de januaro malgraŭ diversnivelaj intervenoj kaj klopodoj restarigi ilian elsendadon.

Tial do, laŭ iniciato de la plej aktivaj aŭskultantoj de tiuj ĉi programoj kaj multnombra socio de iliaj amikoj ĉe la 'fejsbuka' Amikaro de Pola Radio en Esperanto – la grupo, kiu

meminiciate ŝanĝis sian nomon al Amikaro de Pola Retradio en Esperanto – enteprenis klopodojn, por ke la pli ol jarcent-duona tradicio de la parola Esperanto-komunumo, kreiginta ĉirkaŭ la varsoviaj Esperanto-programoj, ne malaperu.

Je la 21a de marto startis eksperimente la regulaj Esperanto-programoj de la Pola Retradio en Esperanto aŭdiĝantaj lunde kaj vendrede. La eksperimento konsistas en tio, ke tiuj programoj – pretigitaj de la nunaj kaj eksaj redaktoroj – komencas de preskaŭ nula financa bazo. Ni tamen entreprenas ĉi tiun provon pro insistaj petoj de la ĝisnunaj aŭskultantoj, kiuj ne sole rekonas la parolkulturajn signifon, sed ankaŭ rimarkis en ili instruan kaj klerigan valorojn. Ni kredas, ke ne mankos subtenantoj kaj patronoj.

Ĝojige estas konstati, ke la nunan eksperimenton senhezite decidis daŭrigi Barbara, Gabi kaj Maciek. Sian kontribuemon deklaris ankaŭ iom malnovaj gekolegoj Andreo Petty, Milada Szewedo, Wojtek Usakiewicz. En Varsovio ne mankas junaj Esperanto-amikoj, virtualaj redaktoroj de nia programo.

Aŭskultu nin, disvastigu nian programon! Esprimu viajn opiniojn, rimarkojn kaj suflorojn. Eĉ per la plej modesta financa kontribuo per la paĝo <http://retradio.posterous.com> subtenu la klopodojn florigi la parolan kulturon de la Esperanto-komunumo.

Nia UEA-konto vars-t atendas vian kontribuemon.

Dankon al ĉiuj, kiuj ne volis kredi, ke en nia Esperanto-komunumo forestos la parola voĉo de Varsovio, la naskiĝurbo de Esperanto!

Barbara Pietrzak,
Varsovio

Novaj Esperantaj podkasto kaj songazetoj

Esperanto-muziko ĉe Radio Vinilkosmo

Ĉu vi ŝatas Esperantan muzikon? Ĉu vi volas aŭskulti kantojn el la novaj Esperantlingvaj sondiskoj? Tiuokaze aŭskultu la programon de Radio Vinilkosmo, kiu estas ĝuebla ekde decembro kiel subkanalo de Esperanto-TV ĉe: <http://esperanto-tv.com/vinilkosmo/>.

Ret-radio el Varsovio

Kiel sciante, la 31an de januaro estis ĉesigitaj la Esperantaj elsendoj de la pola ŝtata radio. Esperantlingvaj sonraportoj el Pollando tamen ne malaperis. Krom la podkasto de Varsovia Vento aperis eĉ nova sonprogramo, lanĉita por la 'fejsbuka' grupo 'Amikaro de Pola Radio en Esperanto, APRE', danke al la persista laboro de Barbara Pietrzak kaj ŝiaj helpantoj. Feliĉe tiu interreta podkasto estas aŭskultebla kaj elŝutebla de iu ajn ĉe la adreso <http://retradio.posterous.com>.

Voĉoj el Japanio

Je la 11a de januaro ĉi-jare oni lanĉis la unuan elsendon de nova podkasto: 'Voĉo el Japanio', plimalpli semajne kompilata, kaj prizorgata de Salih Zakirov. Ĝi okupiĝas ne nur pri japaniaj politikaj kaj movadaj eventoj, sed ankaŭ pri kelkaj Esperantaj lingvaj aferoj. Voĉo el Japanio

estas aŭskultebla ĉe <http://vej.posterous.com>.

Listo de ĉiuj Esperantaj radioj/podkasto

Ĉu vi povus listigi ĉiujn Esperantajn radioelsendojn kaj podkastojn? Ĉu vi povus diri iliajn konkretajn retajn adresojn? Danke al la aŭtomatigebla, programadaj ebloj de interretaj servoj, lastatempe aperis eĉ du retejoj, kiuj ne nur listigas la unuopajn songazetojn, ne nur aŭtomate aldonas al sia listo la freŝe aperantajn novajn numerojn de Esperantaj songazetoj, sed danke al la aŭtomatigebla prilaboro de RSS-fluoj, ili montras eĉ la enhavon de tiuj lastaj numeroj. Ne plu do oni povas plendi pri la neaŭskultado, ke oni ne memoras aŭ ne scias la retajn adresojn de la unuopaj sonmaterialoj.

Jen adresoj de la radio/podkastokolektoj:

- <http://www.esperanto-tv.com/radio/> – projekto de Aaron Irvine
- <http://podkastaro.org/> – aranĝita de Wilfred Hughes
- Ligilo al unuigita podkasto de Esperanto-elsendoj: <http://www.rssmix.com/u/1822869/rss.xml>

Kompilis Ian Mac Dowall kaj Szilvási László; fonto: www.eventoj.hu

Dankon al ĉiuj!

Estimata redaktoro,

Mi volas danki amikojn kaj kolegojn pro malavaraj donacoj je mia 'emeritiĝo' kiel honorofica kasisto de EAB. Bela horloĝo kun gravurita salutmesaĝo estas bone elektita memorigilo. Mi antaŭĝuas elspozojn de kuponoj por ĝardenajoj, kiu permesos elekton de ŝatataj arbustoj kaj potoj. Ili plaĉos dum multaj jaroj. Enkadrigitaj fotografajoj de flirtantaj Esperanto-flagoj nun ornamas mian studĉambron. Dankegon!

Dum la deĵor-jaroj, mi kunlaboris kun multaj admirindaj esperantistoj, kiuj ĝentile instruis kaj kuraĝigis min. Bonajn memorojn mi konservas. Ni ŝuldas al antaŭuloj pro iliaj fidelaj klopodoj. Dankon al ĉiuj!

Mi aparte volas danki al Viv O'Dunne. Ŝi kaptis ĉion, kion mi jetis al ŝi dum la jaroj – ĉu pri administrado, financo, libroservo – plibonigis kaj plukuris. Ŝi faciligis al mi la taskojn samkiel ŝi faras ĉiutage por membroj kaj kuratoroj. Homoj, kiuj kunlaboras kun Viv, scias, ke mi pravas. Dankon!

Mi plene fidas je la nova Administra Komitato de EAB kaj deziras al ili ĉiun sukceson.

Joyce Bunting



Oranĝosuko por afrika teamo 'Esperanto'

Estimata redaktoro,

Rilate la artikolon "La Zamenhofa Tago en Rumonge", kiu aperis en la pasinta numero, mi atentis unu el la ilustraĵoj, ĉar ĝi memorigis min pri Marie King, kiu mortis antaŭ du jaroj, sed dum dudek jaroj gastigis la lokan Esperanto-grupon en Weston-super-Mare. Ĉar ŝi ne havis parencojn, mi plenumis ŝian testamenton. Marie tre interesiĝis pri sporto, kaj kiam mi legis interrete, ke lernejestro en

Rumonge, Hassano Nthonsigaye, nomis sian futbalteamon 'Esperanto', ĉar li instruas al la teamanoj tiun lingvon, mi sendis iom da testamenta mono al li, kiu uzis ĝin por provizi al ili, memore al Marie King, oranĝosukon dum matĉo-paŭzoj. Li afable sendis al mi la jenan foton [vidu dekstre].

David Curtis



Ŝanco alparoli ministron pri eksteraj aferoj

Karaj geamikoj!

Mi petas Vin rigardi la priEsperantajn mesaĝojn kaj la interesajn afiŝojn de Leo De Cooman en la retejo de la hungara Ministro pri Eksteraj Aferoj, s-ro János Martonyi: <http://www.causes.com/causes/561141>.

Se Vi estas membro de Facebook, post klako al 'Join Cause' Vi rajtos ankaŭ alparoli.

Laŭeble alparolu en du lingvoj – en Via gepatra lingvo, kaj en Esperanto. La pli interesajn alparolojn mi tuj tradukos hungaren. Tiel ni povas pruvi la pontolingvan rolon de Esperanto.

Cetere, dankegon al tiuj cent homoj, kiuj lastatempe rigardis la Lernejan Liston kadre de nia retejo <http://www.egalite.hu>.

Ludoviko Molnár,
Hungario



"I cannot see the point"

Dear editor,

As just an ordinary person who believes that Esperanto has some value and would like to see it used by more and more people and to see EAB also grow, I cannot see the point of printing Ian Fantom's *Historia noto* [last issue of *EAB Update*, p. 12].

Certainly there are things in which Ian Fantom rightly draws



Esperantista oranĝosuko prezata en Afriko (vidu la apudan leteron de David Curtis).

to our attention and which I think should be looked into. I will be doing that.

I do want to look into the matter of why, if we had all that capital we went ahead with the selling of Holland Park Avenue, but it will take time. It's not just a matter of how much capital we had at the time, but also what income it was producing and what calls there were on our resources at that time. I seem to remember that Joyce Bunting commissioned an architect or a builder to do a survey of the building and tell us what needed to be done. The result was quite a high figure, I think. But I'm only going from memory and I do need to see the minutes from that time. I'm afraid that I cleared out all my stuff about EAB committees from that time. A pity with hindsight!

Eric Walker, Suffolk



Kromnotoj reage al kromnot(eg)o

Kara redaktoro,

Mi kun intereso legis la artikolon de Ian Fantom en *EAB Update*/Ĝisdate (n-ro 53, p. 12), kiu koncernas ĉefe la 90ajn jarojn kaj la decidon vendi la Esperanto-domon en Holland Park Avenue; samtempe li sendis al mi alian artikolon, kiu temas pri la Londona Klubo, sed kiu enhavas flankrimarkojn pri la

temo traktita en *Update*. Dum longa tempo mi ne intervenis publike en ĉi tiu debato, sed, leginte en lia letero/artikolo pri la Londona Klubo, ke EAB transpreniĝis de 'private school snobs', kiel li diras, kun la traduko 'klasafektuloj el privataj loĝlernejoj', mi decidis finfine reagi – almenaŭ parte ĉar mi dum dek jaroj studis en ĝuste tia lernejo!

Dum pluraj jaroj Ian Fantom verkas, publikigas, cirkuligas artikol(eg)ojn pri EAB kaj ĝiaj diversaj dumjaraj pretenditaj misfaroj. Laŭ liaj asertoj, la asocio fuŝis kaj, pli grave, pekis kaj fiagis dum pluraj jaroj; ĝi eĉ zorge manipulis statistikojn kaj komplotis kontraŭ iuj membroj (ĉefe li mem). En aliaj forumoj, s-ro Fantom insistas pri pluraj aliaj konspiroj, kiuj etendiĝas ne nur al la brita registaro (MI6 kaj tiel plu), sed ankaŭ al tuta ebena.

Iuj samideanoj, ĉu britaj, ĉu eksterlandaj, ŝajne pretas akcepti liajn argumentojn. Eble konspirado ja tiom abundas, kaj, aparte en la reto, ne mankas homoj pretaj kredi je ĉia ajn konspirteorio. Skeptiko rilate registarojn certe saĝas, ni agnosku. Tamen pri EAB, pri kiu temo mi almenaŭ nedubinde rajtas paroli, mi povas certigi, ke liaj argumentoj ne trafas: mi prezidis ĝin de 1994 ĝis 1996 kaj denove en 1997–8.

Ja ekestis debato en tiu periodo pri la falanta membro-nombro kaj kiel ĝin aliri, mi bone memoras. Kaj Will Green ja insiste argumentis, ke ni prefere eluzu nian kapitalon por atentokapte propagandi pri nia lingvo kaj espereble ĉesigu la perdon de membroj. Mi kontraŭis lin, same kiel la plimulto de la estraranoj – inter kiuj, oni notu, oni nombru Stephen Thompson, Malcolm

Jones, Audrey Duerden, Peter Danning, Muriel Shackleton, neniu el kiuj (mi kredas) ĉeestis privatan lernejon. Will estis efika kaj aktiva ĝenerala sekretario, mi diru, kun grandiozaj planoj; tamen, estis klare, ke vastskala kampanjo fiaskus, ĉar ĝuste mankis al ni bazaj rimedoj por trakti (ekzemple) amasan respondaron, petantan informojn, kursojn ktp. Ni tiel riskis elspezi grandajn sumojn sen akiri novajn anojn.

Jam tro longas ĉi tiu respondo. Mi konkludu per kelkaj simplaj konstatoj. La administra komitato tiam, kiel nun, sin montris prudenta: ĝia devo estas ne rapide kaj malprudente foruzi la kapitalon, kiun ĝi heredis (vidu cetere la saĝan redaktoran noton, p. 2 de la lasta *EAB Update*). Mi konsentas, ke ni finance sufiĉe bonfartas – pro saĝa investado kaj agado. Ĉu la vendo de la domo en Londono necesis? Jes, mi opinias, kvankam mi ne tiom entuziasmis pri la translokiĝo: tio, kion s-ro Fantom ne mencias en la artikolo, estis la urĝa bezono organizi grandskalan riparon de la domo, por ke (ekzemple) la apartamento de Martyn McClelland protektiĝu kontraŭ la pluvo, por ke akvo ne subeniru en la butikon ktp. Ĉu eduka bonfara asocio tiel elspezu siajn rimedojn? La estraro opiniis, ke ne.

Unu lasta afero. Mi tiam argumentis kaj plurfoje poste ripetis, ke plaĉus al mi draste malpligrandi membrokotizojn, por ke ili sufiĉu nur por elsendi la revuojn kaj pagi preskostojn. Ni sufiĉe riĉas por tion fari, kaj tiamaniere neniu rezignus pri membrado almenaŭ pro manko de mono. Ĝis nun mi ne sukcesis persvadi aliajn pri miaj argumentoj. Estante apoganto de demokratio, tamen, mi akceptas tiun decidon sen plendo.

Geoffrey Greatrex,
Otavo

LEGEKZERCO

READING PRACTICE

Dum malhela nokto en Kimrio

Estis nigrega kaj ŝtorma nokto. Juna viro vojaĝis tra la montaro. Kaptita de la tempesto, li perdis sian vojon en la malhelo. Vidiĝis malproksima lumo el solstara farmdomo. Li frapis sur la pordon. Ĝin malfermetis la farmisto suspekta. "Nu?", li demandis.

"Sinjoro, mi perdiĝis. Ĉu vi permesus al mi eniri por resekiĝi?"

Malvolonte la farmisto veplene permesis lin eniri. Lia bela edzino aranĝadis la manĝotablon. La farmisto kontrolis, ke ekstere ankoraŭ daŭras la ŝtormo, post kio li kontraŭvole invitis la fremdulon aliĝi al ili ĉe la tablo. La unua plado estis ŝafaĵo. La farmisto tranĉis iom por sia edzino, poste iom por si kaj fine iom por la juna viro. Sekvis pomtorto. La farmisto tranĉis iom por sia edzino, poste iom por si, sed intence ne servis al la juna fremdulo.

Poste venis la horo por enlitiĝi. Daŭris la ŝtormo. La farmisto do malvolonte diris al la juna viro veni supren kun ili. Ĉar troviĝis nur unu lito, li ordonis al sia edzino dormi sur la fora flanko, dum li dormis en la mezo inter ŝi kaj la fremdulo.

Antaŭ sunleviĝo, aŭdiĝis tumulto ekster la domo. Vulpo eniris la kokinejon. La farmisto elsaltis el la lito, kaptis sian pafilon kaj elkuris por forĉasi la rabulon. Kiam li eliris la domon, la edzino tuj turnis sin al la fremdulo, preninte lin per la brako, kaj diris: "Nun, viro, venis via ŝanco. Rapidu malsupren kaj tranĉu al vi pecon da pomtorto."

Kapitalaj investaĵoj de EAB de 1983 ĝis 1998

Historio

Mi kontrolis la grafikojn de Ian Fantom en *EAB-Ĝisdate* n-ro 53, kiu montris kapitalon inter 1983 kaj 1998, kaj trovis ĝin ĝusta. Tamen, ciferoj estas nur parto de la historio.

Mi esploris eĉ pli fruajn protokolojn de BEA Ltd (la

la kaŭzan tendencon, oni devas subtrahi el la raportitaj enspezoj la heredadojn (kiujn oni ne povas antaŭvidi) kaj la venditajn investaĵojn.

Prognozo

La dua grafikaĵo (kiu sekvas) montras takson pri enspezoj pro

investaĵoj, pri antaŭviditaj jarperdoj (bazitaj sur historiaj ciferoj) kaj pri la efiko de tiuj rilate kapitalon – en la supozo, ke oni reprenus el la investaĵoj por plenigi truon ĉe la banko.


Ĝi preterlasas eventualajn antaŭviditajn heredadojn. Ĝi supozas invest-interazon je 5%.

BEA Ltd (la kompanio) kaj EAB (la bonfara asocio) estis kunmetitaj en 1995. Je tiu tempo la vera financa sanstato de la Asocio iĝis klara, kaj oni komencis diskuti solvojn.

La suba grafikaĵo montras tian prognozon pri la estonteco de la Asocio, kian la kasisto kaj kuratoroj faris en 1994. Ĝi montras, ke la kapitalo elĉerpiĝus en 2001.

Joyce Bunting
(honorofica kasisto 1996–2011)

Grafikaĵo 1: Gajnoj kaj perdoj de EAB, 1983–1998



kompanio) de longe antaŭ la starigo de EAB (la bonfara asocio).

En 1971, Amador Diaz jam provis solvi la mankon de enspezo per starigo de kapitala fonduso 'Ora Libro'. Li petis donacojn kaj pruntojn de membroj, grupoj kaj federacioj, kiujn BEA Ltd investu por rikolti ĉiujare renton. Tio ne estis ege sukcesa.


En 1974, la protokolo de BEA Ltd raportis pri "denove jaro de defcito". Tiu kondukis al diskutoj en 1975 pri la vendo de la Esperanto-Centro en Londono por liberigi kapitalon. Translokiĝo al Mezlanda Anglio estis unu el la proponoj, sed ne sukcesis.

En 1976, Grahame Leon Smith, la tiama prezidanto, registris EABn kiel bonfaran (neprofitan) asocion. La havaĵoj de BEA Ltd oni dividis inter la kompanio kaj la bonfara asocio, sed la problemo ne malaperis. Ambaŭ malprofitis. En 1994, la daŭraj defcitoj jam komencis maltrankviligi.

Do ni rigardu la statistikon je tiu tempo. Planante, por eltrovi

Grafikaĵo 2:

Prognozo pri la financa estonteco de EAB je la 1a de novembro 1994



Beletra Almanako

Jam numeron 10 de la belaspekta kaj prestiĝa *Beletra Almanako* eblas aĉeti de EAB kontraŭ £9,30 (plus £1,50 por sendokostoj, aŭ 15% se mendata kun aliaj varoj).

Redaktata de Jorge Camacho, Probal Dasgupta kaj István Ertl, *Beletra Almanako* prezentas kulturajn eseojn, artikolojn, recenzojn kaj leterojn.

La nuna numero, estas – kiel kutime – ilustrita kaj havas 143 paĝojn.

Mediterranea Esperanto-Semajno 2011

– studi kaj festi inter florantaj mimozoj



Kiam ankoraŭ frostas en via regiono, venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj. Vin atendas amika, familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro!

Kia alloga reklamo! Kia tento! Do du membroj de la Skiptona grupo forflugis por partopreni de la 26a de februaro ĝis la 5a de marto en Mediteranea Esperanto-Semajno ĉe Agay en suda Francio kaj trovis ĝuste tion, pri kio la reklamo fanfaronis.

Studejo estis komforta hotelo

Por plibonigi mian nivelon de Esperanto mi ĉeestis la duan el tri kursoj, kiuj okazis nur ĉi-matene kun plua horo antaŭ vespermanĝo. La studejo estis en komforta hotelo, kiu situas apud la maro ĉe la golfo de Agay. Mi tre ĝuis la instruadon de dudek-kvar-jaraĝa Marek Blahuž, sperta komputilisto, kiu regas plurajn

lingvojn. La gvidistino de la tria nivelo estis eminenta verkistino Spomenka Štimatec el Kroatio, kaj laŭ raporto de la alia Skiptonano, Malcolm Jones, la pri-literatura kurso bonege sukcesis.

'Konversaciis post unusemajna studado'

La konata redaktoro de revuo *Esperanto*, Stano Marček el Slovakio, eĉ pli famiĝis lastatempe pro furora kurso 'Esperanto per rekta metodo'. Ĝuste tiun li uzis en la komencanta kurso, kie, nekredeble, virino, kiu antaŭe ne konis Esperanton, kapable komunikis kaj konversaciis post unusemajna studado. Sinjoro Marček gvidis ankaŭ kantsesion ĉiutage gitarludante.

Ĉiuj posttagmezoj estis liberaj, tamen oni povis elekti promenadon, piediradon en loka montaro Esterel, ekskursi aŭ simple resti ĉe la hotelo por interbabili kaj ripozi. Plaĉis al mi

viziti la montaron, kie la plej alta elmergiĝo da ruĝaj rokoj – pro fero – estis mirinda. Gvidistino montris al la grupo diversajn speciojn de sovaĝaj plantoj, arboj, fruktoj kaj fungoj.

Urba mimoza festo

Alia ĝua sperto estis promenado al mimoza festo, kiu okazis en la urbocentro. Muzikistoj, infanoj vestitaj per buntaj kostumoj, ĉevaloj kaj ĉaroj ornamitaj per branĉetoj de mimozfloroj paradis ĝis la ĉefplaco. Ne surprize, ke ili festas tiutempe, ĉar vintrofine la regiono havas plej belan aspekton pro la florado de mimozo.

Parfumata, ora kaj luma la mimozarbo abundege kreskas ne nur ĝardene sed flanke de vojoj, kaj en la montaro, danke al la favora klimato. Duontaga ekskurso ĝis parfumfabriko ĉe la montara urbo Grasse estis ege interesa, kaj montris, ke la regiono ne nur festas florojn sed komerce distiladas ilin por produkti esencon uzatan en parfumoj kaj kosmetikajoj.

Post bongustaj manĝo kaj vino

Vespere, post bongustaj manĝo kaj vino, okazis distraĵoj: filmoj de Esperantaj vojaĝoj, komputil-prezentado, kantado, kaj dum la adiaŭa vespero amuzaj skeĉoj, poezio, loterio kaj dancado.

Mi gratulas la bonkorajn georganizantojn, kiuj bonege informis, konsilis, helpis kaj aranĝis ĉion por kunmeti tiel agrablan Esperanto-semajnon en mirinda loko kaj afabla etoso.

June Campbell,
membro de

Esperanto-Grupo de Skipton

• **La 23a Eŭropa Rendevuo, Stella-Plage, Norda Francio**

La 12an kaj 13an de novembro 2011 okazos en Stella-Plage – en bela feriejo Stella-maris – laŭdire "La plej grava internacia semajnfino en Francio norde de Parizo"! Okazos kvin-nivelaj kursoj, teatro kaj koncerto. Oni vizitos la librofoiron de Le Touquet-Paris-plage. Ekzistas ebleco alveni unu aŭ du tagojn antaŭe por turismi. Aliĝiloj kaj informoj ĉe <http://arrasesperanto.free.fr>.

• **Butler Library stats**

Here are a few statistics received from Geoffrey King, EAB's librarian. Figures in brackets, for comparison, date from the last summary, which was in October:

"The catalogue now contains 7,249 (7,086) items, so is growing at 44 items per month, on average 11 new acquisitions and 33 existing stock.

"The 'Sonbanko' now has 881 (657) items and has had 33,320 (24,000) visits, which I think works out to about 50 per day. I don't get figures on downloads, but I know one intrepid soul is slogging through the Butler/Privat recordings and has asked for a copy of the textbooks.

"The library website has reached 4,850 (3,715) visits, so currently about 61 a day. There are now 103 (91) pages; there is a steady flow of comments and enquiries. A welcome change from the people asking about their Esperantist grandfathers has been a couple of people *volunteering* information about their Esperantist grandfathers!"

• **Geava Klubo**

Ĉu vi havas genepojn por esperantistigi? Nova 'Geava' Klubo proponas ĉiumonatajn donacojn de ludoj kaj agadoj por lerni kaj distriĝi kune.

Ne necesas esti vera avĉjo aŭ avinjo por membriĝi: gepatroj, geonkloj, geamikoj estas tute bonvenaj!

(Kaj, se vi ne havas genepon aŭ eĉ kvazaŭ-genepon, oni invitas membriĝi por doni la genepon sperton al infano, aŭ klaso de infanoj, malriĉa. En tiu kazo, viaj monataj donacoj estos sendataj al la infano aŭ klaso elektita.)

Membriĝi en la Geava Klubo kostas po AU\$100 por jaro, kaj anoj ricevos poŝte donacojn (aŭ pakajon da donacetoj) ĉi-monate, kiu valoras proksimume



AU\$10, tiel ke vi ĉiam havos ion novan por fari kun la genepoj.

Sendajoj por 2011 inkluzivos libretojn, ludojn, puzlojn, KDon, ludilojn, aĵojn por kolorigi kaj plenigi, kaj multe pli.

Membriĝo de Geava Klubo subtenas ankaŭ la kreadon kaj disvastigon de allogaj instruiloj por Esperanto. Aliĝo eblas ĉe www.mondeto.com/geava-klubo.

(Informis Penny Vos, Aŭstralio.)

• **Ekzpozicio de planlingvoj**

El la sekva ligo eblas ĉerpi detalojn pri planlingva ekspozicio, okazonta en 2012 en Bavara Ŝtata Biblioteko: www.bsb-muenchen.de/Einzeldarstellung.403+M5d573d27caa.0.

• **Estrarkunveno de UEA rete**

En nova eldono de la filmjurnalo *UEAviva*, estraranoj Probal Dasgupta, Claude Nourmont kaj Barbara Pietrzak rakontas pri la aprila kunsido de la Estraro de UEA. Eblas sekvi ĝin ĉe www.youtube.com/ueaviva#p/a/u/0/ngpq_Flm5Tw.

• **Elŝuti interesajn librojn**

Per la sekva retadreso eblas elŝuti la informlibregon *Esperanto en perspektivo* (1974), redaktitan i.a.

de Ivo Lapenna, (kaj multajn pliajn interesajn librojn): <http://denizo.opia.dk/la.trezorejo/tekstoj/libroj.pdf/>.

• **Ĉu veturi al la Itala Kongreso?**

Oni sendis al ni liston de kialoj, pro kiuj vojaĝi al la venonta Itala Kongreso de Esperanto, kiu okazos de la 20a ĝis la 27a de aŭgusto en Torino. Jen kelkaj: por viziti la belegan urbon kaj ĉirkaŭaĵon (plenplan de

muzeoj, kasteloj, lagoj ks.); por festi la 150an datrevenon de la unuiĝo de Italio; por la koncertoj (ege internaciaj); por la seminarioj (ĉi-jare unu seminario ricevis eŭropan subvencion kadre de la projekto Grundtvig, sekve de kio la eksterlandaj partoprenantoj ricevos rabaton por loĝado – <http://seminario.esperanto.it> – por sendi aliĝpeton al ĝi, plenu la aliĝilon al la kongreso, indikante, ke vi deziras partopreni); por la ekzamenoj (Torino estas unu el la kvar mondaj okazoj ĉi-jare por ekzameniĝi pri Esperanto laŭ la Eŭropa Normokadro KER); por la interesaj kursoj, prelegoj ktp.

La kongresejo estos en belega vilao sur monteto apud la urbo-centro, kie eblas komforte loĝi, aŭ en tendo aŭ studenta domo. Informiĝu ĉe <http://kongreso.esperanto.it>.

• **Atentigo**

Hilary Chapman atentigis nin pri retpaĝo: www.progressives.org.uk/columns/column.asp?c=658.

• **Komisiitoj pri eksteraj rilatoj**

La Estraro de UEA antaŭ nelonge nomis siajn komisiitojn pri eksteraj rilatoj por la nuna ofic-

periodo. Ili estas: *UN-Novjorko*: Humphrey Tonkin (ĉefreprezentanto), Neil Blonstein, Thomas Eccardt, Scott Page; *UN-Vieno*: Hans Michael Maitzen (ĉefreprezentanto), Gregor Hinker, Stella Maitzen; *UN-Genevo*: Stefano Keller (ĉefreprezentanto), Charmian Common, Nicole Margot, Francesco Reale; *Eŭropa Lingva Konsilio*: Wim Jansen; *Konsilio de Eŭropo*: Cyrille Hurstel; *Nutraĵa kaj Agrikultura Organizaĵo de UN (FAO)*: Ranieri Clerici, Renato Corsetti; *Unesko*: Renée Triolle (ĉefreprezentanto), Barbara Despiney, François Lo Jacomo, Aleks Kadar.

• Esperanto-instruado en la lernejoj de Herzberg

Jam dum kelkaj jaroj okazas regula instruado de Esperanto en la baznivela lernejo Nicolai. La rektoro s-ro Keller nun transdonis apartan lingvoinstruan ĉambron por Esperanto kaj la turka. Nova lingvoinstruistino Ewa Kukielba instruos tie la

multnaciecan Esperanto-klason, kie ankaŭ denaska parolantino de Esperanto Estera partoprenos la fakultativan Esperanto-kurson.

Ĝus oni komencis instrui la lingvon ankaŭ en la mezgrada lernejo. Zsofia Korody varbis dudek infanojn, kiuj devenas el multaj landoj, por kelkara kurso. La rektorino ĝojas pri la bona rezulto.

En la loka gimnazio estas ĉirkaŭ sep gejunuloj, kiuj parolas aŭ lernas kun entuziasmo.

• 28a Internacia Festivalo

Xanten, germana urbeto proksima al Nederlando, bonvenigas al la 28a Internacia Festivalo jarfine. Komforta domo kun belaj salonoj kaj etosoplana trinkejo proponas agrablan tutsemajnan restadon. La urbeto estas konata pro la arkeologia parko kun rekonstruoj el la romia epoko. La retpoŝta adreso estas: HDP@internacia-festivalo.de; interreto: www.internacia-festivalo.de.

• Familia Esperanto

Malpli junaj membroj eble memoras la organon *Gepatra Bulteno*. *Familia Esperanto* estas neregula retbulteno por Esperanto-familioj; ĝi aperis papere ekde 2000 ĝis '03 kaj sekve rete ekde 2007 (http://uea.org/rondo_familia/index). Nun UEA intencas reeldoni ĝin, ideale trifoje jare, sed praktike kiam akumuliĝas sufiĉe da materialo. Ĝia redaktontaro estas la novaj membroj de Rondo Familia: Johano Derks (redaktoro), Claude Rouget (antaŭa redaktoro kaj konsilanto), Adenjo Cherieer kaj Bert Schumann (IIK).

• Golden wedding anniversary

On 31 March the *Herts Advertiser* printed an article and photo to celebrate the 50th wedding anniversary of Joyce and Alan Bunting. Joyce has until recently been EAB's long-standing honorary treasurer. A paragraph was devoted to reporting Joyce's work for Esperanto.

• Royal good wishes

A letter from Buckingham Palace arrived too late for a mention in the Eastbourne Congress booklet. It reads: "Her Majesty appreciates your continued support and, in return, sends her warm good wishes to all concerned for a most successful and enjoyable gathering." David Ryan, Director, Private Secretary's Office.

• Informilo interlingvistika

La 76a numero de *Informilo por interlingvistoj* (n-ro 1, 2011) estas jam disponebla en la interreto: <http://esperantic.org/en/communications/ipi/archive>. La informilon eldonas Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) dank'al, parte, daŭra monsubteno de Esperantic Studies Foundation (ESF). Ĝi estas ĉefe bibliografie orientita, tamen ĝi publikigas ankaŭ informojn el la universitata medio, eseojn, recenzojn,

Nekrologoj – Obituaries

Jennifer Gilmour, 75-jara, mortis en Vestono ĉe la Maro, la 15an de februaro. Ŝi estis sekretario de Sudokcidenta Esperanto-Federacio dum kelkaj jaroj. Naskita kaj edukita en Skotlando, ŝi instruis en Germanio, Svislando kaj Londono, antaŭ ol emeritiĝi en Vestono, kie ŝi gajnis Diplomon de Esperanto-Asocio de Britio, kaj aliĝis al Esperanto-Rondo de Vudspring, kun kiu ŝi feris en Greziljono. Jennifer aranĝis semajnfinajn kunvenojn por la Federacio kaj gvidis malgrandan grupon en Bado. Ŝi korespondis tramonde, kaj lertege enesperantigis plurajn klasikajn angla-lingvajn novelojn. Ŝian bonegan Esperanto-libraron akceptis Memoriga Biblioteko Butler, de kiu EABanoj rajtas pruntepreni ekzemplerojn.

David Curtis

Rosalind Walter (naskita Norwood) mortis je la 9a de marto en prizorgejo. Ŝia filo Graham aranĝis la kremacion. Ŝi naskiĝis en novembro 1930.

En Esperantujo ŝi aktivis en la Londona Esperanto-Klubo kaj korektis korespondkursojn. Speciale ŝi helpis afrikanojn, kaj mi petis al Renato Corsetti transsendi la informojn al afrikanoj.

La filo deziras, ke donacoj memore al Rosalind iru al porafrika fonduso. Tio ekzistas kaj ĉe nia nacia asocio, EAB, kaj ĉe UEA.

Helen Fantom

raportojn kaj aliajn materialojn. La paperan eldonon eblas ricevi de la Centra Oficejo de UEA, kie ankoraŭ haveblas ĉiuj kajeroj. La retan version de la bulteno oni povas elŝuti ĉe la ESF-retpaĝaro (<http://esperantic.org/en/communications/ipi/archive>).

• Afrika muzikgrupo

La muzika eldono Vinilkosmo aperigis tri muzikvideojn de la grupo Konga Espero. Vidu ĉe <http://www.vinilkosmo-mp3.com/videos-video-clip-lingvo-homaro-konga-espero-p-1019>.

• Pri Esperanto dulingve

En la printempa eldono de *Llais*, publikserva sindikata gazeto en Kimrio, Hilary Chapman verkis kaj kimre kaj angle belan peceton pri siaj spertoj uzante Esperanton kaj sia optimismo pri ĝia estonteco.

• Francoj rezistas la anglan

Mediapart kaj aliaj informretejoj de Francio publikigis alvokon al lingva rezistado, ĉefe pro la anonco de la Ministro pri Edukado, kies intenco estas lernigi la anglan jam al tri-jaraj infanoj. Tiu anonco estis senteble malpopulara. Manifestacio okazis la 19an de marto, iniciate de Collectif Unitaire Républicain pour la Résistance, l'Initiative et l'Emancipation Linguistique (Unueca Respublika Kolektivo por la Lingva Rezistado, la Iniciato kaj Emancipado).

La alvoko legeblas ĉe: www.mediapart.fr/en/club/blog/nicole-orthous/250111/appeal-resistance-linguistique.

Aludo pri Esperanto aperas en ĝia franclingva *Progresista Manifesto por la Defendo de la Franca Lingvo*: "ni ne malŝatas strebadon por disvastigi alian sendependan lingvon tia, kia estas Esperanto".

• Simpozia kajero de ILEI

La internacia instruista organizaĵo ILEI anoncis la aperigon de la Simpozia Kajero el sia Konfer-

ILEI kaj UEA subtenas la universitatan trejnadon

Tra la pasintaj du jaroj UEA kaj ILEI kunlaboris por finance kaj praktike subteni la instruisto-trejnprogramon de Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Pollando. Ili tion faris per disponigo de kvar stipendioj en la valoro de 250 eŭroj, por helpi al precipe junaj kursanoj el malpli pagipovaj landoj mildigi la kurs- kaj vojaĝ-kostojn. Prioritaton oni donis al tiuj, kiuj povis demonstri klaran intencon aktive instrui la lingvon poste aŭ eĉ dume. Spertoj el tiuj jaroj montriĝis pozitivaj – kelkaj subtenitoj nun aktive instruas; iuj ludas pliajn aktivajn rolojn, ĉu en junularaj, lokaj aŭ landaj asocioj. Tio inkluzivas freŝbakitajn esperantistojn, kiuj ene de tri-kvar jaroj levis sin al la universitata nivelo.

Por 2011, UEA kaj ILEI denove anoncas la eblon pri la nove lanĉota tri-jara kursaro pri interlingvistiko, kiu kovras vastan gamon de temoj – lingvo, kulturo, literaturo, tradukado, utiligo, kaj – nelaste – pedagogio. La kurs-komenco okazos en septembro 2011, kaj la stipendioj rilatos al la unuaj du semestroj de la ses-semestra tuto. Tiu kurso estas en la universitato plene oficiala; kursfinintoj ricevos ŝtate rekonatan diplomon.

Kandidatiĝoj por la kursaro akcepteblas ĝis la 15a de aŭgusto 2011. Petoj por stipendioj akcepteblas ĝis la 20a de julio, aŭ surloke ĝis la tria tago de la Universala Kongreso. Preferon ricevos junaj kandidatoj kun limigita pagipovo, kiuj povas klare montri intencojn instrui Esperanton aŭ alimaniere aktivi movade dum kaj post la kurso. Ricevontoj de stipendioj devos subskribi kun la stipendiantoj kontrakton pri plenumo de la kursodevoj.

Pliaj informoj: <http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index>.

Stefan MacGill, Prezidanto, ILEI

enco en Parma en 2006, kunlabore kun Universitato de Parma. La kajero estas trilingva (Ea, angla, itala), 53-paĝa. Jen iom el la enhavo de la kajero: D. Astori: *Esperanto en Parma kaj la rolo de Giorgio Canuto*; H. Tonkin: *Fremdlingva studado en Usono: Demandoj kaj problemoj*; A. Carli: *Lingvoj de la internacia scienca komunikado*; M. La Torre: *Interlingva edukado: strategioj kaj solvoj* (resumo); F. Gobbo: *Pedagogiaj modeloj por la distanca lingvolernado. La kazo de Esperanto*; J.-P. Boulet: *Lernado de Esperanto kiel edukado al paco*.

La kajeroj estas senpage ŝuteblaj el www.ilei.info, sed por ILEI tio ne estas senkosta, do viaj donacoj al ĝia Fonduso Szerdahelyi bonvenas.

• Semajno en Hispanio

La venonta 'Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo' okazos en Malgrat de Mar, apud Barcelono, en Hotelo Cartago Nova (1–8 oktobro). La adreso estas: s-ro Luis Serrano Pérez, Apartado 423, E-08200 Sabadell (Barcelona). Tel. (+34) 93 727.50 21; rete: luis_serrano@ya.com; retpaĝo: <http://personales.ya.com/semajno>.

New Members of EAB

R.W. Blow, Leicester
Joan Butler, Salford
C.R. Cheatle, Hauxton
Simon Cook, Northampton
David Fuller, Bath
Dr Andrew P. Gee, Bristol
Christopher J. Kerr, Cambridge
Claudia Milne, London
Richard Trezise, Bridlington

New Supporters

Gerald Hickman, Birmingham

Deceased members

Richard Copland, Ryhope
Jennifer Gilmour, Weston-super-Mare
Rosalind Walter, Cobham
Joyce White, Clacton-on-Sea

CONGRATULATIONS

Exam success

Elementary Exam (Distinction):
Jonathan Webley, Newton Mearns
Intermediate Exam (Distinction):
Michael Heary, Manchester

• Invitas vin viviĝi Luar-Kastelon Greziljono

Oni petas vin viviĝi la kulturdomon per via ĉeesto. Pliaj informoj troviĝas ĉe: <http://gresillon.org/>. □

New books and CDs available from EAB

• Please add 15% for p.&p. where not otherwise indicated – min. £1.50. Cheques payable to 'EAB', or contact Esperanto House (tel. 0845 230 1887) to pay by debit (or credit) card. Visit www.esperanto-gb.org/eab/bookcat for our full list.

Carina kantas por vi en Esperanto (CD) Carina Gerlach. Stockholm: JomArt, 2009. 28 min. Ten songs performed by young Carina Gerlach, accompanied by her parents Jomart kaj Nataŝa. £17.00

La eta princo Antoine de Saint-Exupéry. Trans. from the French by P. Delaire. Kanada Eo-Asocio / Eo-





France, 2010 (3rd ed.). 93 p., 23 cm, colour-illus. Fable about an interplanetary traveller, which makes profound observations about life. £11.50

Fabelo pri la triopo Arkadij and Boris Strugackij. Trans. from the Russian by M. Bronŝtejn. Moscow: Impeto, 2010. 189 p., 22cm. The authors' "most satirical" novel on the Soviet state system. £13.40

Knedu min sinjorino! Renato Corsetti et al. Thaumiers, France: La Kancerkliniko, 1987. 23 p., 21 cm. Taboo and insulting expressions in Esperanto. £3.40
Knedu min sinjorino! & Tabuaj vortoj en mondlingvo (CD-ROM). *Special offer:* buy Renato Corsetti's book and the CD-ROM of Don Lord's talk (see below) together at the special price of £6.70 pack (including p.&p.)

Kompendio de la Kapitalo de Karlo Markso Carlo Cafiero. Trans. from the French by P. Levi. Paris: SAT, 2009. 155 p., 18 cm. Summary of Karl Marx's fundamental work on capitalism, in non-specialist language. £9.40


Tabuaj vortoj en mondlingvo (CD-ROM). Barlaston: EAB, 2006. Lecture by Don Lord on taboo words (50 min. film and text file), the *Sekretaj sonetoj* by Kálmán Kalocsay (text file) and a rude-words mini dictionary (text file). No. 2 in the EAB "education resources" series. £3.50 (including p.&p.)



Tri nigraj ŝipoj Margrit Vollertsen-Diewerge. Trans. from the German by S. Hague. Erlangen: 2009. 32 p., 21 cm, illustrated. Charming fable in three languages (Esperanto, German, Russian) with accompanying CD reading the texts aloud. £16.80

BARLASTONO *bis!*

Dek unu elstaraj prelegoj el la 1980aj kaj '90aj jaroj en DVD-prezento nur po £3,90



Sampreze haveblas ankaŭ DVD kun 4 filmetoj pri Esperanto-agado en Barlastono (22 + 20 + 16 + 9 = 67 minutoj).

Je aĉeto de ĉiuj 12 diskoj samtempe (£46,80), vi ricevos *senpage* 2 kromajn diskojn (normale £7 kune) pri la Brita Kongreso de 1989 en Stoke-on-Trent. Aldonu 15%ojn por sendokostoj (minimume £1,50).

Ivo Lapenna
La solidariĝa rolo de Esperanto 1985 (74 min.)

Marjorie Boulton
Esperanto: ĉu lingvo eŭropa por la tuta mondo? 1992 (75 min.)

Jorge Camacho
Ĉu verki aŭ ne verki Esperante?; La tekstoj de rok-muzika grupo en Esperanto 1993 (ambaŭ po 62 min.)

Gerrit Berveling
Esperanto-literaturo; Tradukado de literaturaj tekstoj kaj kompara literaturscienco 1994 (77 kaj 84 min.)

Leo Vulfoviĉ
Naciista movado en Sovetunio 1995 (83 min.)

Don Lord
Nekonataj faktoj pri Esperanto 1995 (48 min.)

Marjorie Boulton
La procezo, la sorĉistino kaj ŝia kato 1996 (71 min.)

Renato Corsetti
Unulingveco estas kuracebla 1996 (72 min.)

William Auld
Esperanto: proleta lingvo 1997 (43 min.), kun ero el *La kulturbazo historia de la Esperanto-movado* (1985) (7 min.)